

August Heinrich Hoffmann,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree vesperiĝas  
ĉie en la rond',  
paco subeniĝas  
kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas  
ĉe la roko jen,  
kaj ĝi daŭre bruas  
plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu  
endormigas ĝin,  
sonoril' neni  
je la tago-fin'.

Mia koro, tia  
estas ankaŭ vi!  
Pacon trovos mia  
koro nur en Di'.

...

August Heinrich Hoffmann,  
Abendlied

Abend wird es wieder,  
über Wald und Feld  
säuselt Frieden nieder,  
und es ruht die Welt.

Nur der Bach ergießet  
sich am Felsen dort,  
und er braust und fließet  
immer, immer fort.

Und kein Abend bringet  
Frieden ihm und Ruh',  
keine Glocke klinget  
ihm ein Rastlied zu.

So in deinem Streben  
bist, mein Herz, auch du.  
Gott nur kann dir geben  
wahre Abendruh!

...

August Heinrich Hoffmann,  
Abendlied

*tradukita de Manfred Ratislavo*

Nun vesper' fariĝas  
Ree tie ĉi,  
Paco subeniĝas  
Kaj ripozas ni.

Rivereto fluas  
Ĉe la roko sen  
Ĉeso kaj ĝi bruas  
Plu kaj plue jen.

Sonoril' neni  
Ripozigas ĝin,  
Ne dormigas iu  
Ĝin je l' tagofin'.

Tia, mia koro,  
Estas ankaŭ vi.  
Donu, ho Sinjoro,  
Pacon vi al ĝi.

...

Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2013-01-27.

Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)

La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, \*1798-04-02 – †1874-01-19).

Arg-645-1300 (2012-11-27 18:18:40)

Siehe auch: [http://de.wikipedia.org/wiki/August\\_Heinrich\\_Hoffmann\\_von\\_Fallersleben](http://de.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben).

Vidu ankaŭ: [http://eo.wikipedia.org/wiki/August\\_Heinrich\\_Hoffmann\\_von\\_Fallersleben](http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben) kaj <http://www.musicanet.org/robokopp/fallers.html>.

Siehe auch: <http://www.swr.de/swr2/program/sendungen/wiegenlieder/rueckschau/-/id=556006/nid=5556006/did=6102144/pv=mplayer/vv=popup/1vijptk/index.html>.

Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff*, *Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde*, Germanio, \*1938-11-04) en 2012-11.

Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)

Vidu ankaŭ: [http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied\\_\(Fallersleben\)](http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)).

La muziknotoj troviĝas en [http://www.lieder-archiv.de/abend\\_wird\\_es\\_wieder-notenblatt\\_300026.html](http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html), la melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.